


CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 96**

N-RO 5 (73), DECEMBRO 2018

Enhavo

Originala poezio

Tatjana Auderskaja Limerikoj 3

Tradukita poezio

Komparu malsamajn tradukojn de la samaj poemoj

“Anĉar” de Aleksandr Puŝkin, tradukita de Kolomano Kaloscaj kaj Mikaelo

Bronŝtejn 4

Romanco “Ho, brilu, brilu, mia stel!” en tradukoj de Nikolaj Lozgaĉev kaj Ludmila Novikova

Tradukita poezio

Jubileo

Andrej Voznesenskij. Sola batalanto en kampo. Tradukis Ludmila Novikova

7

Pjotr Ĉajkovskij. Konvaloj. Tradukis Klara Ilutoviĉ 8

Tradukita poezio

En orfejoj mi longe suferis... (kanto de senhejma knabo). Tradukis Gennadij

Ŝlepĉenko 11

Tradukita prozo

Mikaelo V. Ŝĉerbakov. La radiko de vivo. Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko 12

Libroj

Rigardo post 100 jaroj. Recenzo far Nikolao Gudskov pri la libro “Antaŭ unu jarcento” 24

Konkurso de tradukoj 24

Humuro

Mikaelo Povorin. Atendu mian donacon! 25

Aleksandr Vulyĥ Nesimetria respondo, aŭ Peace dove. Tradukis Mikaelo Povorin 27





LIMERIKOJ

Tatjana Auderskaja

Iu person' el Kievo
Longe dronadis en revo.
Poste li revekiĝis,
Kaj terure timiĝis,
Ĉar okazis al revo la krevo.

Iu knabin' el Odeso
Falis en am' sen permeso.
Ŝi suferis kaj ĝuis,
Kun pasi' rendezuis,
Sed finiĝis ja ĉio per ĉeso...

Iu sprita rabisto el Bresto
Prenis kason tutplene, sen resto.
Estis en tiu kas'
De la mono amas':
Unu groŝo sur fundo de l' kesto.

Iu juna student' el Rostovo
Foje dormis en fremda alkovo.
Kiam venis maten'
Li rimarkis kun splen'
Ke ĉe li restis sola ĉurovo.

Iu bela virin' el Barato
Kredis, ke ĉiu vir' estas frato.
Post nelonga turne'
Ŝi komprenis, ke ne,
Sed ne estis por ŝi sortobato.

Brita sir' Isaak, saĝa homo,
Ĉiam timis eliri el domo.
Lin ne trafis fripon'
Tamen falis plafon'
Kaj ĝi pezis pli multe, ol pomo!

Iu usona virino
Volis lavi nur per lavmaŝino.
Sed... ho, kiu konfuz'!
Ne sukcesis amuz':
Estas "lavi" ne "love"! Punkto, fino.

Iu turka paŝa' en haremo
Ekdeziris koiti ĝis tremo.
Sed diskuris inar',
Kaj li restis sen par'.
Venis emancipad' al haremo!

Iu virin' el Komio
 Tre similis al mava simio.
 Kaj ne nur la vizaĝ',
 Bedaŭrinde la saĝ'
 Sama, kiel ĉe l'besta specio.

Tradukita poezio
Komparu malsamajn tradukojn de la samaj poemoj



АНЧАР
 Александр Пушкин



В пустыне чахлой и скупой,
 На почве, зноем
 раскаленной,
 Анчар, как грозный
 часовой,
 Стоит — один во всей
 вселенной.

Природа жаждущих степей
 Его в день гнева породила,
 И зелень мертвую ветвей
 И корни ядом напоила.

ANĈARO
 Aleksandr Puŝkin
 Tradukis Kálmán Kalocsay



En la dezert' sterile nuda,
 El grund' bakita de sun-ardo
 Anĉar' elĝermis, staras muta.
 Ne kreskis en proksim' eĉ
 kardo.

Ĝin naskis la soifa tero
 En furiozo mondmalbena,
 Kaj per veneno de kolero
 Saturis ĉiun fibron plena.

ANTIARO
 A. S. Puŝkin
 Tradukis Mikaelo Bronŝtejn



En inkandeska grunda ard',
 En ter' avara de l' dezerto,
 Minace staras Antiar' —
 kiel vaĉant' en Universo.

Ĝin iam naskis kun malben'
 De l' seka step' natur' severa,
 Kaj estis plenaj de venen'
 L' radikoj kaj branĉaro verda.

<p>Яд каплет сквозь его кору, К полудню растопясь от зною, И застывает ввечеру Густой прозрачною смолою.</p>	<p>Venen' filtrigās tra la krusto En la tagmeza varmo suna, Ĉe l' vento de vesperkrepusko Koaglas je rezino bruna.</p>	<p>Tra ĝian ŝelon la venen' Gutadas, likas el la sino, kaj restas ĉe l' vespera ven' surtrunke dense la rezino.</p>
<p>К нему и птица не летит, И тигр нейдет: лишь вихорь черный На древо смерти набезит — И мчится прочь, уже тлетворный.</p>	<p>Proksimon ĝian bird' evitas Kaj timas tigro. Se la sibla Venteg' la branĉojn ekagitas, Tuj plu ĝi flugas, venenkribra.</p>	<p>Ne tuŝas l' morto-arbon spur' de flugo birda, paŝo tigra. Venenon ĝian sorbas nur preterfluganta vento nigra.</p>
<p>И если туча оросит, Блуждая, лист его дремучий, С его ветвей, уж ядовит, Стекает дождь в песок горючий.</p>	<p>Kaj se la nuboj de l' ĉielo Pluverojn sur anĉaron ŝutas, De la folioj kaj de l' ŝelo Venene tiuj teren gutas.</p>	<p>Se foje iu vaga nub' aspergos ĝian foliaron, pluv' jam venena gutas sub ensable mornan antiaron.</p>
<p>Но человека человек Послал к анчару властным взглядом, И тот послушно в путь потек И к утру возвратился с ядом.</p>	<p>Hom' homon tamen por aliro Komandis per rigard' rigora. Fidela iris tiu viro, Revenis kun la suk' horora.</p>	<p>Rigardpotence homon hom' al antiar' ordone sendis, kaj iris li kun obeem' kaj kun venen' matene venis.</p>
<p>Принес он смертную смолу Да ветвь с увядшими листами, И пот по бледному челу Струился хладными ручьями;</p>	<p>Portante krom rezin' fatala Velkintan branĉon en tornistro, Kun ŝvit' malvarma sur la pala Vizaĝ' sin trenis la servisto.</p>	<p>Alportis velkan branĉon nur kun la rezino mortavida, kaj ŝvit' malvarma fluis sur la frunto, kiel roĵo frida.</p>
<p>Принес — и ослабел и лег Под сводом шалаша на лыки, И умер бедный раб у ног Непобедимого владыки.</p>	<p>Li falis tie tuj en sveno, Pro elĉerpiĝ' de l' lasta forto, Ĉe l' trono de la suvereno La sklavon tiel trafis morto.</p>	<p>Liberiĝinta de la pred' li sur tapiŝon falis febla kaj mortis tuj ĉe la pied' de la reganto nevenkebla.</p>
<p>А царь тем ядом напитал Свои послушливые стрелы И с ними гибель разослал К соседям в чуждые пределы.</p>	<p>La princo ĉiujn sagojn suki Ordonis per venen' anĉara, Per arkoj tiel sendis flugi La morton al popol' najbara.</p>	<p>Sed la regant' per la venen' aspergis sagojn obeemajn, kaj pereigon sendis en la apudlimajn landojn fremdajn.</p>

Василий Чувевский. Гори, гори, моя звезда. Романс (Музыка Петра Булахова) (Muziko de Pjotr Bulaĥov)



Гори, гори, моя звезда,
Гори, звезда приветная!
Ты у меня одна заветная,
Другой не будет никогда.

Сойдёт ли ночь на землю
ясная,
Звёзд много блещет в
небесах,
Но ты одна, моя
прекрасная,
Горишь в отрадных мне
лучах.

Звезда надежды
благодатная,
Звезда любви волшебных
дней,
Ты будешь вечно
незакатная
В душе тоскующей моей.

Твоих лучей небесной
силою
Вся жизнь моя озарена.
Умру ли я – ты над
могилою
Гори, гори, моя
звезда! 1846

Vasilij Ĉujevskij. Ho, brilu, brilu, mia stel'.
Romanco
Traduko de Nikolaj Lozgaĉev



Radiu, brulu, mia stel',
la stel' de am' saluta, ja
ĉe mi vi estas senrefuta kaj
por ĉiam unu sola cel'.

La stel' de am', la stelo sorĉa
vi,
la stelo de l' pasinta temp',
eterne 'stas memoro dolĉa vi
en la anima sinturment'.

Kaj mia viv' de la magi-influ'
aŭroras en la luma hel'.
Se mortos mi, do super
tombo plu
radiu, brulu, mia stel'.

**(unufoje presita en
"Sezonoj", 1989:21)**

Vasilij Ĉujevskij. Ho, brilu, brilu, mia stel'.
Traduko de Ludmila Novikova (2018)



Ho, brilu, brilu, mia stel',
Karesu min el alta for'!
Por ĉiam vin aspiras mia
kor',
Ne logos min alia bel'.

Se klara nokt' sobiras de l'
ĉiel',
Scintilas steloj en abund',
Sed sola vi, belega mia stel',
Por mi lumbrilas el profund'.

Vi estas stelo de espera ben',
La stel' de sorĉa amtrezor',
Vi ĉiam restos sensubira en
Eterne trista mia kor'!

Prilumas min per la ĉiela
fort'
Dum tuta vivo via hel'.
Se mortos mi – vi eĉ post
mia mort'
Plu brilu, brilu, mia stel'!

Jubilee

Tradukita poezio

Omaĝe al 85-jara naskiĝdato de

A. Voznesenskij

(12.05.1933 — 01.06. 2010)



Андрей Вознесенский.

Один в поле воин

Один в поле воин.
Раз нету второго,
не вижу причины откладывать бой.
Единственной жизнью
прикрыта дорога.
Единственной спичкой гремит коробок.
Один в поле воин. Один в небе Бог.
Вас нет со мной рядом,
дозорных отрядов.
Убиты. Отправились в вечный покой.
Две звёздочки сверху
поставите свечкой
тому, кто остался доигрывать бой.
Дай смерти и воли,
волшебное поле.
Я в арифметике не силён.
Не красть вам Россию,
блатные батыи.
И имя вам — свора, а не легион.
И слева и справа
удары оравы.
Я был одинок среди стужи ночной,
Удары ретивы —
теплей в коллективе!

Andrej Voznesenskij.

Sola batalanto en kampo

Mi solas en kampo.
Neniun atendas,
Sed cedi batalon ne estas pretekst’.
Mi per mia vivo
la vojon defendas.
Per last-alumeto bruetas poŝkest’.
Mi solas en kampo. Kaj Di’ – en tutest’.
Ne estas ĉe l’ manoj
la samtaĉmentanoj.
Murditas. Foriris al la ĉielsin’.
Do metu du stelojn
kiel kandelojn
por mi, postrestinta batali ĝis fin’.
Liberon sen rampo
mi petas ĉe l’ kampo.
Aritmetiko ja – ne por mi.
Ne cedos Rusi’ ja
al bandoj batijaj¹.
Kaj nom’ ties – hordo, sed ne la legi’.
De flank’ dekstra, liva
la band’ ofensivas.
Sed mi unuopas en nokta frosteg’.
Batad’ intensivas
sen varm’ kolektiva,

¹ Batijo (mongole – *Bat haan*, angle – *Batu Khan*, ruse - *Батый*) – mongola ŝtatestro de la Ora Hordo (mezepoka ŝtato en Eŭrazio), gvidanto de la mongola militirado en Eŭropon, inkluzive Rusujon (1236-43).

И нет перспективы мне выиграть бой.
 Нет Сергия Радонежского с тобою,
 Грехи отпустить
 и тоску остудить.
 Один в поле воин, но если есть поле —
 то, значит, вас двое,
 и ты не один.
 Так русский писатель — полтыщи лет после,
 всей грязи назло —
 попросит развеять его в чистом поле
 за то, что его в сорок первом спасло.
 За мною останется поле великое
 и тысячелетья побед и невзгод.
 Счастливым моим, перерезанным криком
 зову тебя, поле!
 Поле придёт.

1980

kaj ne perspektivas por mi glora venk'.
 Sergio el Radonej² kun mi ne estas,
 do nek la absolv',
 nek anima konsol'.
 Mi solas en kampo, sed se l' kampo restas –
 do tio atestas,
 ke mi ne en sol'.
 Jen foje l' verkist' – post duon' de jarmilo
 ekde la kvardek unua koŝmar' –
 ekpetos disblovi lin en kamp-savilo,
 kiu defendis lin en tiu jar'.
 Post mi restos vasta kamppeg' infinita
 kaj la jarmiloj de venkoj post frap'.
 Per mia krieg', pro feliĉ' intermita,
 mi vokas vin, kampo!
 Venos la kamp'.

Traduko de Ludmila Novikova (2018)

Pjotr Ĉajkovskij (07.05.1840 – 06.11.1893) Okaze de 125-jariĝo post la forpaso

P.I. Ĉajkovskij famegas kiel komponisto, tamen, pri kio oni malmulte scias, foje verkis poemojn. El liaj poemoj plej famiĝis la lirikaĵo “Konvaloj” pro tio, ke ĝi fariĝis populara romano. Tamen – kaj tio mem estas interesa fakto! – la muzikon por la versoj komponis ne Ĉajkovskij mem, sed lia amiko Anton Arenskij. Do, jen la originala teksto kaj la poemo, esperantigita de Klara Ilutoviĉ.



Ландыши

Когда в конце весны в последний раз срываю
 Любимые цветы, — тоска мне давит грудь,
 И к будущему я молитвенно взываю:
 Хоть раз еще хочу на ландыши взглянуть.

Konvaloj

Se fine de printemp' la lastan fojon plukas
 La karajn florojn mi, obsedas min angor',
 Kaj mi al la estont' en miaj preĝoj flugas
 Nur fojon vidi plu konvalojn de l' ador'.

² Sergio el Rádoneĵ (ruse – *Сергий Радонежский*, angle – *Sergii Radonezhsky*, *Sergius of Radonezh*) – religia korifeo de la mezepoka Rusujo, unu el la plej kultaj sanktuloj de la Rusa ortodoksa eklezio; Radoneĵ – naskiĝurbo de la sanktulo.

Вот отцвели они. Стрелой промчалось лето,
Короче стали дни, умолк пернатый хор,
Скупее солнце нам дает тепла и света,
И разостлал уж лес свой лиственный ковер.

Потом, когда придет пора зимы суровой
И снежной пеленой оденутся леса,
Уныло я брожу и жду с тоскою новой,
Чтоб солнышком весны блеснули небеса.

Не радуют меня ни книга, ни беседа,
Ни быстрый бег саней, ни бала шумный
блеск,
Ни Патти, ни театр, ни тонкости обеда,
Ни тлеющих полен в камине тихий треск.

Я жду весны. И вот волшебница явилась,
Свой саван сбросил лес и нам готовит тень,
И реки потекли, и роща огласилась,
И наконец настал давно желанный день!

Скорее в лес!.. Бегу знакомою тропую.
Ужель сбылись мечты, осуществились сны?..
Вот он! Склонясь к земле, я трепетной рукою
Срываю чудный дар волшебницы-весны.

О ландыш! Отчего так радуешь ты взоры?
Другие есть цветы роскошней и пышней,
И ярче краски в них, и веселей узоры,
Но прелести в них нет таинственной твоей.

В чем тайна чар твоих? Что ты душе вещаешь?
Чем манишь ты к себе и сердце веселишь?
Иль радостей былых ты призрак
воскрешаешь?
Или блаженство нам грядущее сулишь?

Не знаю. Но меня твое благоуханье,
Как винная струя, и греет, и пьянит.
Как музыка, оно стесняет мне дыханье
И, как огонь любви, питает жар ланит.

И счастлив я, пока цветешь ты, ландыш
скромный,
От скуки зимних дней давно прошел и след,
И нет гнетущих дум, и сердце в неге томной
Приветствует с тобой забвенью зол и бед.

Ne floras ili jam. Forsagis la somero
Pli kurtas tagoj nun, silentas birda ĥor^o.
Avaras sun^o pri lum^o kaj varmo por la tero.
Sterniĝis en arbar^o tapiŝe folior^o.

Kaj poste, kiam temp^o de frida vintro venos
Kaj por arbara vest^o ekblankos neĝmantel^o,
Malgaje vagas mi atende, kiam benos
Per suno de printemp^o ekbrilo de ĉiel^o.

Ĝojigas nek legaj^o, nek dialoga brilo,
Nek rapidkura sled^o, nek ba^o je la bruplen^o,
Nek Patti, nek oper^o, nek de tagmanĝ subtilo,
Nek milda kraketad^o de ŝtipoj en kamen^o.

Printempon vokas mi. Kaj la magi^o aŭroris.
Arbar sen mortatuk^o pretigas ombron jam,
River^o ekfluis, bosk^o vekite eksonoris,
Finfine venis tag^o en la revata fam^o!

Pli baldaŭ al arbar^o!.. Mi kuras laŭ la pado.
Ĉu vera realiĝ^o de l^o revo, song^o, dezir^o?..
Jen ĝi! mi plukas je l^o adora mantremado
L^o donacon de printemp^o en ties arda spir^o.

Kial vi, ho konval^o, rigardojn tiel ravas?
Aliaj floroj pli ja luksas por l^o alvok^o,
Pli brilas je l^o kolor^o, pli gajan belon havas,
Sed estas ili sen mistera via log^o.

Per kio sorĉas vi inspire por l^o animo?
Kiel allogas vi gajecon de la kor^o?
Ĉu la pasinta ĝoj revenas je l^o sublumo?
Ĉu helas la promes^o de nia gracia hor^o?

Ne scias mi. Sed min de la arom^o logema
Varmigas vivbalzam^o ĝis l^o ebrieca fart^o,
Kaj, kiel pro muzik^o, spirado iĝos prema
Kaj, kiel en ambrul^o, ruĝigas vangojn ard^o.

Feliĉas mi, konval^o modesta, dum vi floras,
De vintra tagenu^o delonge eĉ ne spur^o,
Nenia nigra pens^o, kaj la anim^o langvoras
Gratule de l^o forges^o pri plagoj kaj terur^o.

Но ты отцвел. Опять чередой однообразной
Дни тихо потекут, и прежнего сильней
Томиться буду я тоскою неотвязной,
Мучительной мечтой о счастье майских дней.

И вот, когда-нибудь весна опять разбудит
И от оков воздвигнет мир живой,
Но час пробьет. Меня — среди живых не будет,
Я встречу, как и все, черед свой роковой.

Что будет там?.. Куда, в час смерти
окрыленный,
Мой дух, вельенью вняв, беззвучно воспарит?
Ответа нет! Молчи, мой ум неугомонный,
Тебе не разгадать, чем вечность нас дарит.

Но, как природа вся, мы, жаждой жить
влекомы,
Зовем тебя и ждем, красавица весна!
Нам радости земли так близки, так знакомы, —
Зияющая пасть могилы так темна!

1878, Флоренция

Sed flori ĉesis vi. Kaj ree monotone
Ekfluos mia viv', kaj kun pli granda fort'
Angor' turmentos min, obsede, malĝojdone,
Per sombra mia rev' pri l' maja dolĉa sort'.


Iam denove l' mond' vekigoŝ en printempo
Kaj ĉenojn de malvarm' viglige jetos for.
Sed mi ne vivos plu. Alvenos mia tempo,
Kial al ĉiu hom' la fata vivohor'.

Kaj tie... Kien do morthore flugopreta
L' spirit al la vok' eksoros en silent'?
Ne venas la respond' al mia saĝ' impeta,
Enigmas l' eterneĉ' pri sia sakrament'.

Sed, kiel la natur', ni vivsoifaj restas,
Ni vokas vin, printemp', kaj ni atendas vin!
Kaj ĝojon de la ter' ni plu elkore festas,
Dum tiel nigras faŭk' de l' tombo en la fin'.

1878, Florenco

Tradukis Klara Ilutoviĉ



Tradukita poezio

En orfejoj mi longe suferis... (kanto de senhejma knabo)

Vortoj kaj muziko de nekonataj aŭtoroj
Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko

По приютам я с детства скитался
Не имея родного угла...
Ах, зачем я на свет появился,
Ах, зачем меня мать родила...

А когда из приюта я вышел
И пошел наниматься в завод
Меня мастер в конторе не принял,
Говорит, что "не вышел твой год"!

И пошел я по свету скитаться,
По карманам я начал шмонать.
По чужим, по буржуйским карманам
Стал рубли и копейки сшибать.

Осторожный раз барин попался,
Меня за ухо цепко схватил...
Тут недолго судья разбирался
И в "литовский" меня засадил!

Из тюрьмы я, мальчишка, сорвался
И опять не имею угла...
Ах, зачем я на свет появился,
Ах, зачем меня мать родила!

En orfejoj mi longe suferis,
viv' senhejma- jen mia destin'.
Kiucele sur ter' mi aperis,
kaj por kio min naskis patrin'...

Al fabrik' post orfej' mi ekiris
perlabori por pan' kun fervor'.
En kontoro al mi majstro diris:
"Vi ne aĝas por nia labor'."

Kaj denove mizer' senespera,
kaj nevole mi iĝis krimul'.
Por riĉul' mi fariĝis danĝera:
ŝtelis monon el poŝ', retikul'.

Singardema sinjoro ekvidis,
dum ŝtelado min kaptis je zon'...
Kaj ne daŭre juĝisto meditis,
trovis lokon por mi en prizon'!

En prizon' mi ne longe suferis,
kaj denove trampado sen fin'.
Kiucele sur ter' mi aperis,
kaj por kio min naskis patrin'?



Tradukita prozo

Mikaelo Vasiljeviĉ Ŝĉerbakov (1890 – 1956) naskiĝis en Moskvo. Ekde junaĝo li lernis la francan, germanan kaj anglan lingvojn. Li finis kurson de fiziko-matematika fakultato de la Imperatora supera teknika lernejo, kaj poste okupiĝis pri problemoj de atoma energio en apudmoskva sciencexplora instituto. En 1914 li estis mobilizita



Михаил Шербаков. Шанхай, 1931 г.

en grupon de junaj oficiroj, kiujn oni sendis en Francion por lerni aviadon en la Liona fluglernejo. Post fino de la kursoj Mikaelo Ŝĉerbakov militis en Balkana fronto. En 1919 li iĝas volontulo de la Fremdula Legio, kie ricevis francan civitanecan, kaj post la militservo iĝis servisto de hindoĉinia banko en Hanojo. Sed pro sia aventura karaktero en 1920 li lasas la postenon, kaj kun franca pasporto en poŝo, transveturas el Vjetnamio en Vladivostokon. En la urbo, estante redaktoro de monarkia ĵurnalo “Russkij kraj” (La Rusa regiono) Mikaelo Ŝĉerbakov komencas sian literaturan agadon. Poste estis Ŝanhajo, kie li pasigis grandan parton de sia vivo post la elmigro. En 1943 eldonejo “Vrata” eldonis libron de elektitaj rakontoj de M. Ŝĉerbakov “La radiko de vivo”. Kaj post unu jaro estis eldonita lia poetika poemaro “Otgul” (Kompensa ferio). La libroj resumis lian

literaturan agadon. Pro malsano Mikaelo Ŝĉerbakov estis devigata reveni en Francion en urbon Bulonjo kie li mortis en 1956.

LA RADIKO DE VIVO

Mikaelo V. Ŝĉerbakov

«Kie estas ĝinsengo, tie ankaŭ estas tigroj»

Ĉina proverbo

Jiang-Kui mortigis Li-Fulin-on, kolektanton de ĝinsengo, tute ne pro persona malico al li. Li eĉ ne konis, ke tiu nomiĝis Li-Fulin. Kaj, certe, li neniel supozis, ke en eta fanzo*, sub ĉifonoj li trovos tian mirindan radikon. Li agis kiel malsata besto, kiu devas mortigi iun por vivi. Ĉasado kontraŭ «bluaj fazanoj» estis lia metio.

Ĉio ĉi okazis pro tio, ke ili ambaŭ tute diverse rigardis al la vivo. Sur nordaj deklivoj de montetoj, en tajgaj herboj Li-Fulin serĉadis altan tigon de ĝinsengo, sed Jiang-Kui ankaŭ serĉadis ĝinsengon, sed faris tion per alia maniero. Ĉiun radikon oni serĉis dum multaj semajnoj, iufoje eĉ monatojn, sed ĉe kolektanto de ĝinsengo li ofte vidis kelke da radikoj. Akiri la radikojn estis pli simple ol daŭre serĉi tiujn. Tamen li ne mortigis vane posedanton de ĝinsengo. Li daŭre esploris necesan homon, kaj poste konsideris, ĉu mortigi tiun aŭ ne.

Tio okazis ankaŭ ĉifoje. Jiang-Kui kaŝobservis Li-Fulin-on jam dum tri tagoj, singarde kaj persiste, ĉar Li-Fulin mem estis tre singarda spertulo kaj, krome li havis prajman fusilon, similan al fusilo de Jiang-Kui.

Dum du lastaj tagoj Li-Fulin estis tre singarda ĉar, elterigante trovitan radikon en valo, li proksime ekaŭdis krakon de seka branĉo en arbustoj. Li tuj ĵetis sin al la

brueto, sed trovis nenium. Se li farus ankoraŭ cent paŝojn antaŭen, li translokiĝus al praŭloj je kvardek ok horoj pli frue: Jiang-Kui staris malantaŭ korkokverko kun streĉita ĉano kaj atendis lin. Sed Jiang-Kui ĝuste trafi en celon povis nur en mallonga distanco, ĉar lia fusilo estis antikva, kaj oni ŝargis ĝin tra antaŭa aperturo de pafubo. Maltrafa pafo minacus al li mem per morto.

Certe, kun egalaj ŝancoj rilate al la armiloj, Jiang-Kui havis unu certan avantaĝon: li sciis, ke al li necesas mortigi Li-Fulin-on, sed samtempe Li-Fulin nur suspektis pri lia intenco. Tial estis mortigita ne Jiang-Kui, sed Li-Fulin.

En tiu tempo en la fanzo Li-Fulin kalkansidis antaŭ lignofajro kaj en kaldrono kuiris pastobulojn el faruno kaj tre odora sovaĝa ajlo. Por mallauĉe alŝteliĝi al truo, kiu anstataŭis fenestron, Jiang-Kui konsumis preskaŭ unu horon. Sed li estis tolerema kaj, kiel antaŭe estis dirite, li ne rajtis riski.

Finfine Jiang-Kui ŝovis longan pafubon tra la fenestro kaj ellasis la ĉanon. Li-Fulin, kvazaŭ farante profundan riverencon, falis vizaĝe rekte al la lignofajro. Kun pulva brulodoro, kiu plenigis la fanzon, akre ekodoris bruligita homa hararo. Jiang-Kui eniris, flanken forŝovis la kadavron, ankoraŭfoje boligis la pastobulojn, kaj formanĝis tiujn kun granda plezuro, ĉar li estis tre malsata.

Poste li esploris internon de la fanzo, kaj trovis sub lito el freŝe hakitaj abiaj branĉoj, la radikon, envolvitan en muskon kaj bluan ĉifonon. Vidante, ke tio estas ĝinsengo, li metis la volvaĵon sur plankon, profunde riverencis al ĝi, kaj balbutis ekzorcon.

Tio estis tute mirinda radiko. La manoj de Jiang-Kui tuŝis multajn radikojn de ĝinsengo, sed li ne imagis, ke la mistera kreskaĵo povas esti tiom granda. En tiu momento li ekmemoris rakontojn pri tio, ke ĝinsengo povas kreski dum centoj, eĉ miloj da jaroj. La radiko estis longa je pli ol kvarono de la brako, kun densa barbo el faden-radiketoj. Ĝi kun siaj strangajoj similis al kriplulo kun krucigitaj kaj volvitaj kruroj. Eĉ ĝia maldika kolo kaj malglata kapeto super la korpo, de kiu ĉiujare en printempo elkreskiĝas supertera tigo, aspektis kiel la homaj. Krome, ĝi estis vira radiko, kun du kruroj, kio pli grandigis ĝian koston.

Jiang-Kui pesis sur la manplato la radikon kaj enkaŭ komencis taksi koston, sed tuj miskalkulis. En Hai-Shen-Wei* komercistoj de amuletoj kaj kurac-herboj faris jene: sur unu pesiltason ili metis alportitan el tajgo radikon, kaj sur la alian elŝutis oran sablon. Kiam plenigitaj pesiltasoj iĝas egalpezaj, ili aldonas saman kvanton da oro kaj transdonas ĉion al vendisto. Sed tiamaniere akaparistoj taksis nur etajn ĝlatajn radikojn, longajn kiel montrofinĝro, kiuj aspektas kiel blanka rafaneto. Tian radikon oni aĉetis por sesdek – sepdek dajanoj*. Sed por malnova radiko, kiu iomete aspektas kiel homfiĝuro, ĝia kosto pli grandigis ne proporcie al ĝia pezo, sed kiel kreskas kosto de grandaj brilantoj.

Iam en junaĝo, kiam li ankoraŭ ne ĉasis kontraŭ «bluaj fazanoj», Jiang-Kui vidis radikon, kiun oni aĉetis por dekunu miloj da dajanoj por alveturigi tiun en Pekinon al imperatoro mem. Sed radiko, kiu nun troviĝas en liaj manoj, estas pli granda kaj pli similas al homa figuro.

– Dekunu miloj da grandaj, sonoraj, pezaj arĝentaj dajanoj!.. – kun la fermetitaj okuloj ekpensis Jiang-Kui, kaj denove respekte metis la radikon sur plankon.

Subite li tre varmiĝis. Li demoviĝis de la lignofajro, demetis tajlitajn nigrajn ĉapeton, kaj forviŝis ŝviton de sia razita fumaĵita kranio. La mistera Radiko de Vivo brulvundis liajn manojn. Ĝi disradiis tian magian forton, kiun la maldikaj ŝosoj ensuĉis el terprofundoj, verŝajne dum centjaroj. Kiu detronigita manĉuria sangoprincino aŭ, vestita en malmolaj silkoj, olda riĉulo povos aĉeti ĝin kaj por si

maceri en alkoholo ĉion resanigantan kuracilon? Kuracilo, kiu donas longan vivon, flamigas sangon de oldulo per forto kaj pasio de junulo, kaj faranta lian sekiĝintan hauton tenera kaj elasta, kiun havas juna virgulino...

Ŝajnis, ke Jiang-Kui vidis kiel Li-Fulin, nun kuŝanta apud la lignofajro kun truo sur la postkranio, malrapide iris tra rosa densa valo, zorge disklinate plektokreskaĵojn per sia bastono kun fera pinto. Jen li rimarkis altan ĝis la talio tigon, kronita per umbelo el helruĝaj beroj, kun longformaj folioj, similaj al homa mano. Verŝajne Li-Fulin kvazaŭmortis pro ravo, deĵetis sian apogbastonon, genuis sin kaj komencis preĝi al la mirakla kreskaĵo por ke ĝi ne malaperu en terprofundo.

Verŝajne, fininte preĝi, li rapide ĉirkaŭrigardis – ĉu iu kaŝobservas lin – sed apud la trovaĵo neniu estis krom svarmoj de tajgaj moskitoj kaj kuloj.

Poste, sendube, sur proksiman arbon li pendigis ruĝan ĉifonon kun sorĉparolo, direktita al montara spirito, kiu direktas tigon gardi la Radikon de Vivo, elŝiris kreskaĵojn ĉirkaŭ la tigo, trakondukis kanaleton el la najbara roĵo, kaj enloĝiĝis en forlasita eta fanzo, kiu troviĝis je kelkaj lioj de la loko.

Tie li fastis, preĝis, kaj pacience atendis ĝis kiam aŭtunaj stelaroj okupos feliĉan pozicion kaj li povas elterigi la Radikon de Vivo per speciala fosileto, eltranĉita el korno de cervo. Verŝajne tio okazis antaŭnelonge ĉar muroj de la fanzo, denove kovritaj per argilo, estis ankoraŭ malsekaj.

En tiu momento pensoj de Jiang-Kui turnis lin al liaj propraj aferoj. Ne, li ne plu ĉasos kontraŭ «bluaj fazanoj», neniam ĉasos! Nun tio al li tute ne necesas. Por la grandvalora radiko li povas aĉeti duonon de sia naskiĝloka vilaĝo, havi edzinon kaj unu, du, eĉ tri dikkorpajn, grasajn konkubinojn, kaj eĉ ĉiutage manĝegi bolkuiritajn tripangojn kaj naĝilojn de ŝarko... Kaj post manĝado li povos fumi multe, multe da pipoj kun dolĉa, plej bona junnana opio...

Blankhaŭtaj diabloj sufiĉe longe batis lin per liniilo en monaheja lernejo en Zhi-fu! Sufiĉe forte krie skoldis lin, malfeliĉan timigitan knabon, rusaj sinjorinoj el Hai-Shen-Wei, devigante ĉiutage perdi lian indecon. Ankaŭ estu malbenita la tajgo, kie ĉiu ĉasas kontraŭ la alia, kie tiuj rusaj stultuloj ne povas organizi ordon en ĝi, sed nur mortigas unu la alian per mitralo...

Por li tre tedis la tajgo! Li per barĝo transnavigos golfon kaj vendos la radikon en Hai-Shen-Wei. Ne, estas pli rezone se li bone kaŝos ĝin kaj atingos konatan Zhi-fu-on; tie li vendos tiun pli multekoste... Tamen, ĉu vendi ĝin en Hai-Shen-Wei? – ĉar ĉio povas okazi en maro!... Kion nun signifas por li perdi aldone unu milon da dajanoj?

Jiang-Kui ebruiĝis pro siaj pensoj, kiel pro ĉina vodko. La domo, konkubinoj, ŝarkaj naĝiloj – ĉio ĉi, volvita en musko kaj blua ĉifono, kuŝas ĉi tie, antaŭ li. La lignofajro fumis kaj agacis la okulojn. Granda griza kolubro, vivanta en fanzo de Li-Fulin, kaj kiu kaŝis sin dum pafado, denove aperis, kun siblado transrampis vizaĝon de estinta mastro, kaj buliĝis en angulo, direktante sian kapon al la lignofajro.

Oni povas rimarki lumon! – supozis Jiang-Kui, ekremis kaj rapide fermis nefermetitan pordon for de tajga mallumo, varma malseka punkto, plenigita de susurado.

Sed pri tio li devus pripensi ankoraŭ antaŭ kvaronhoro. Tiam, probable, li havus kaj edzinojn, kaj tripangojn. Sed Jiang-Kui malfruis estingi la lignofajron dum la tutaj kvindek minutoj, sed tajgo ne pardonas eĉ etajn erarojn.

Krome, Jiang-Kui havis nur du antikvajn fusilojn, kiujn oni ŝargas tra antaŭa aperturo de pafubo, tamen koreo Kim havis kun si modernan fusilon kun

kartoĉŝargilo por kvin kartoĉoj. Kaj pro tio Jiang-Kui nun ne havis avantaĝon, kvankam ili ambaŭ egale bone sciis, ke unu el ili devas pere.

Kim estis «blanka cigno». Tiele en tajgo oni nomas koreojn pro iliaj neĝblanka kitelo, fiksita per rubandetoj surbruste. Ii neniam ĉasis kontraŭ homoj. Li mem vagadis sur montetoj, serĉante la Radikon de Vivo. Sed Jiang-Kui ĝustatempe ne estingis la lignofajron kaj forgesis fermeti la pordon, kaj Kim sur bordo de rivereto rimarkis desube lumigitan fumon, proksimiĝis al la fanzo, kaj tra fendo ekvidis Jiang-Kui-n kaj mortintan Li-Fulin-on. Mirinda radiko en la manoj de la ĉino klarigis al li ĉion ceteran. Vidinte grandecon de la radiko, Kim tuj konfuziĝis.

Tamen li estis timulo. Tial, kiam la pordo subite malfermiĝis, kaj ili renkontiĝis vizaĝo kontraŭ vizaĝo, Kim ne pafis al Jiang-Kui, kiel farus ĉiu kuraĝa homo en la situacio, sed deflankiĝis for. La pordo tuj fermiĝis, ekknaris riglilo, kaj lumo en fendoj estingiĝis.

Kim profundigis en mallumon, kaj el post proksima arbusto eluzis tutan kartoĉŝargilon, pafante al la pordo kaj dikaj muroj. En la fanzo oni ne respondis. Tiam Kim eltiris el la sino alumetojn, kaj alrampis al proksima angulo de la fanzo, sed post palpado de la muro li enŝovis alumetskatolon reen: la muro estis tute malseka. Li rampe revenis al sia ŝirmejo kaj ekmeditis.

Li sciis, ke en la fanzo, antaŭ ĉio, estas la Radiko de Vivo, poste du homoj, vivanta kaj mortinta, kaj, finfine, du prajmaj fusiloj. La radiko estis tia, kian Kim ankoraŭ neniam vidis. Por ĝi li povus ricevi nigrarizan kampon, barĝon, kaj grandegan kvanton da rizo. Vivanta homo prenis la radikon, apartenantan al la mortinto, tio estis klara. Sekve al Kim necesas fari tiel, ke en la fanzo anstataŭ unu vivanto kaj unu mortinto, restus du mortintoj.

Bedaŭrinde, en la fanzo krom du homo estis ankoraŭ du prajmaj fusiloj, kiuj malhelpis al li tuj plenumi tion. Tiuj du fusiloj malgajnis antaŭ lia fusilo, sed, kiel estis dirite pli frue, Kim estis timulo, kaj tute ne volis riski sian maldensan, kvazaŭ algluita per apartaj haroj, barbeton, Tial li decidis aliamaniere uzi sian avantaĝon, kaj komencis atendi.

Tiutempe pordo de la fanzo nerimarkeble iomete malfermiĝis. Li ne vidis tion, nur ekaŭdis knaron kaj tuj respondis per pafado: «Mi estas ĉi tie!». La riglilo denove fermiĝis. Kiam malantaŭ montetoj ĉielo ekroziĝis, li derampis je distanco kie prajmaj fusiloj de la ĉino jam ne estis danĝeraj.

Nun la situacio ŝanĝiĝis. En la fanzo restis nur la Radiko de Vivo kaj vivanta homo, kiujn li devas konsideri. Sed vivanta homo por resti viva, devas manĝi kaj trinki. Certe, ĝi povus formanĝi eĉ mortintan homon, se por ĝi mankus manĝaĵo, sed en la fanzo forestis akvo. Por akiri ĝin, necesus eliri. Sed oni povus eliri nur tra la pordo, kiu estis en zono de pripafado de Kim, ĉar rampi tra la fenestro sukcesus nur leporo. La afero estis senriska. Al Kim restis nur observi por ke la homo nokte ne foriru tra subfosajo, kaj atendi kiam soifo elpelos ĝin kontraŭ kuglo. Kio estas soifo, li sciis sufiĉe bone. La Radiko de Vivo baldaŭ devos esti en liaj manoj.

Intertempe Jiang-Kui fartis tre malbone. Li tuj konsideris situacion, vidinte la koreon post la pordo. Renversinte kaldronon sur la lignofajron, li prenis ŝargitan fusilon de Li-Fulin kaj kaŭris sin en malproksima angulo. Sed malamiko ne eniris. Anstataŭ tiu ekparolis ĝia fusilo, kies kuglo gratis haŭton sur genuo de Jiang-Kui. La pafilo ne nur demonstris sin, sed ankaŭ taksis karakteron de la malamiko.

Nu, «blanka cigno»!.. – malestime ekpensis la ĉino kaj iomete deflankiĝis. En la sama momento li tre ofendiĝis: ĉu necesus perdi tri tagojn pro la stultulo, por al li

mem trafi en kaptilon de la koreo-timulo. Kaj tio okazis tiam, kiam en liaj manoj estis fanzoj, edzinoj kaj ŝarkaj naĝiloj...

Jiang-Kui tre indignis pro tia maljusto. Kun fusilo enmane li aŭdace direktis sin al la pordo, sed for de la pordo deflugis granda splito, kaj li devis reveni. Jiang-Kui komprenis, ke «blanka cigno» sciis kiel uzi sian avantaĝon, kaj ke nun komenciĝas vera sieĝo. Tiam li ekmemoris pri akvo, elverŝita sur la lignofajron, kaj li kun malbeno perpiede forŝovis malplenan kaldronon: en la fanzo akvo tute forestis.

Jiang-Kui ne timis malsaton. Taiga metio kutimigis lin al daŭra malsato. Krome, li antaŭnelonge sate manĝis, kaj, por ekstrema okazo, en la fanzo ankoraŭ restis «blua fazano». Sed jen soifo!.. Ĝi estas pli terura ol malsato, kaj jam sentiĝis post la pastubuloj kun sovaĝa ajlo. Jiang-Kui sciis, ke nur soifo povas forpeli lin post la pordon, kie atendis fusilo de la koreo. Necesis serĉi alian eliron el la situacio.

La fanzo estis tre malvasta. Ĝia larĝo estis nur iomete pli longa ol kuŝloko de Li Fulin.

Ĉerko!.. – subite ekpensis Jiang-Kui. Li antaŭvidis, ke se la koreo ne ŝparos ĉirkaŭ kvindek kartoĉojn, kaj senelekte pafos kontraŭ la muroj, tiam, sendube, li estos serioze vundita. Ne, senprokraste necesas provi foriri tra subfoŝaĵo.

Li almetis kadavron de Li Fulin kiel ŝildo al la pordo, fiksitis tiun per rimeno, kaj per ĉasista tranĉilo komencis senbrue fosi plankon ĉe kontraŭa muro de la fanzo, permane eligante teron. Sub piedpremita planko estis mola grundo, sed en profundo je kvarono de la brako la tranĉilo ekgrincis sur ŝtono. Pli profunde troviĝis nura granita tavolo.

Li malice deĵetis la tranĉilon, sed, ekpensis, reprenis ĝin kaj daŭrigis fosi. En sunleviĝo estis preta foso, kie li povus kaŝi sin se okazos pripafado.

Soifo turmentis lin pli kaj pli forte. Pro la dika ajlo lia buŝo brulis. Multe da dajanoj li nun fordonus por unu taso da plej malbona teo, kiu estas vendata por du ĉohoj* en ĉiu vilaĝa butiketo!.. Tamen estonte ankoraŭ estos varmega aŭtuna tago de atendado. La subfosado ne sukcesis. Restis nur neatendita atako. Sed ĝi eblas nur en mallumo. Jiang-Kui eksidis sur rando de sia eta tranĉeo, kaj komencis streĉe atendi nokton, maĉante spliton por mensogi soifon. Post muro de la fanzo klare lirlis roĝo, kaj ĝia sono boris cerbon de Jiang-Kui. Li volis ŝtopi la orelojn nur por ne aŭdi kvietan plaŭdadon de akvo.

Se Jiang-Kui malpacience atendis mallumon, sed Kim-koreo tre timis ĝin. Tage li vidis la fanzon, kaj povis ĉiuflanke observi ĝin, moviĝante tra arbustoj. Nokte li povos observi nuran pordon, kaj samtempe en nokta mallumo forte manifestiĝis lia timemo. Penso pri tio, ke nokte la ginsengo povas malaperi, malkvietiĝis lin.

Tial ĉirkaŭ duontage li ne eltenis longan atendon kaj decidis komenci pactraktadon. Alirinte al kontinua muro de la fanzo, Kim tre atente aŭskultis. Ene regis tomba silento.

– Hodja*, ĉu via dormi-dormi? – defore komencis la koreo en difektita rusa lingvo, ĉar li ne sciis la ĉinan.

En la fanzo oni ne respondis.

– Hodja, - denove ekparolis la koreo, - kial via tre kvereli? Mia mortigi ne volas... Mia volas ginsengon. Via doni ginsengon, du fusilon doni, via Zhi-fu foriri, mia ne malhelpi!..

En la fanzo responde aŭdiĝis brueto kaj obtuza grumblado. Jiang-Kui antaŭvidis, ke Kim nome tiel kondutos, sed li nek unu sekundon hezitis. La Radiko de Vivo apartenis nur al li. Li perlaboris ĝin, riskante sian vivon. La radiko estis lia

neapartigebla proprajo, la sama kiel liaj fusilo, vesto, pulvuj. Tio estis vera rabado!.. Ne, li pretas dekfoje riski sian vivon, ol libervole fordoni la mirindan kreskaĵon al la koreo-timulo.

Li ĵetis sin al la pordo, sed el la karno de Li Fulin, trabatita per nova kuglo, ekŝprucis fiodora likvaĵo: aŭdinte brueton en la fanzo, la koreo tuj okupis sian antaŭan pozicion.

Trapis ankoraŭ ses turmentaj horoj. La suno malalte pendis super montetoj. Finanta tago estis varma kaj seka. Ĉe la pordo kadavro de Li Fulin odoris dolĉe kaj naŭze. Ĉe ĝiaj piedoj dense kolektiĝis formikoj. Jiang-Kui volis forĝeti la kadavron, sed ekmemoris, ke ĝi ankoraŭ povas esti utila. Pro soifo la gorĝo ŝvelis kaj dolore piketis. La lipoj krevis. La lango iĝis granda, kaj ŝajnis, ke por ĝi ne sufiĉas libera spaco en la buŝo.

Li singarde ekrigardis tra la fenestro. La koreo kun fusilo enmane sidis je sendanĝera distanco malantaŭ ŝtono apud rojbordo. La eta roĵo gluglis sur rondŝtonetoj tute apude kun la fanzo. Jiang-Kui vidis kiel ŝvela, peza suno zigzage rebrilegis de la fonto. El ĉebordaj kreskaĵoj aperis plata serpenta kapeto, kiu ekbalanciĝis en aero, kaj ektiris grizan, metalkoloran rubandon de la korpo en akvon.

Verŝajne tio estis la sama kolubro, kiu tranoktis en la fanzo. En la buŝo de homo, ĉasisto, ĉio interne elsekiĝis pro soifo, sed tiu fia rampulo povis trinki ĝis kiam ĝi ekkrevos, eĉ baniĝi...

Jiang-Kui ekrincis per la dentoj. Li mallaŭte elŝovis paftubon tra la fenestro kaj pene celis al la koreo. Kuglo resalte faris etan fontanon el akvogutoj kaj malaperis, ne atinginte la celon. La koreo ekstremis, tuj prenis fusilon, sed poste ridegis: ja pafis ne Jiang-Kui, sed lia soifo!

– Hodĵa, - mokaj vortoj aŭdiĝis laŭ la roĵo – via malmulte promeni... Via la ginsengon doni, mia malvarman akvon... Ĉu bone?...

Sed Kim timis alproksimiĝon de nokto. Antaŭ sunsubiro mem li ankoraŭfoje penis elpeli Jiang-Kui-on. Multaj kugloj alflugis al la fanzo. La ĉino tuj kuŝis sin en la fosita tranĉeo kaj vidis kiel sur la muro unu post la alia aperas kuglaj aperturoj. La kugloj premlatiĝis en freŝa teramaso, zumadis kiel grandaj burdoj kaj surŝutis Jiang-Kui-on per tero kun metalaj splitetoj. Eluzinte dek kartoĉŝargilojn, Kim iomete atendis, poste alrampis al la pordo kaj rigardis tra unu el fendoj. En duonlumo li ekvidis, ke Jiang-Kui permane ŝovas falintajn terpecojn al teramaso, kaj li tuj forrampis al antaŭa loko.

Kiam mallumo iĝis pli densa, la ĉino pretis sin al elatako. Li jam ne povis toleri plu. Gluglado de proksima roĵo frenezis lin. Enŝovinte la Radikon de Vivo en la sinon, li deliĝis korpon de Li-Fulin. Al proksimaj arbustoj estis distanco nur je dek ses paŝoj, kaj poste estis akvo, malvarma superba akvo, kaj kofroj kun arĝentaj sonoraj dajanoj...

Jiang-Kui malfermetis la pordon kaj eksterigis la kadavron, kaŝinte sin malantaŭ pordofosto. Ruzaĵo sukcesis. Kvin rapidaj pafoj tratranĉis tajgan kvieton. Tiuj estis dekstre. Kiam la koreo ŝanĝis kartoĉŝargilojn, Jiang-Kui ĵetis sin maldekstren, sed apud la arbustoj mem li, kvazaŭ perbruste puŝiĝis al nevidata arbotrunko, eksaltis kaj enaere transkapiĝis. Io dufoje ekbatis al lia flanko, kaj poste super li kliniĝis timigita vizaĝo, kun vasta zigomo kaj kvazaŭ algluita barbeto. Li eksentis kiel oni malbutonis lian duonkaftanon, kaj tuj mortis.

Koreo Kim deprenis de Jiang-Kui la Radikon de Vivo kaj, rimarkinte makulojn de sango sur la faltoriĉa haŭto, iris al roĵo por lavi sin. Sed li estis koreo, kaj ne sciis necesajn sorĉparolojn kontraŭ genio-gardistoj de la mirakla radiko. Cetere, povas esti, lia animo en antaŭa enkarniĝo troviĝis en besto, kaj al ĝi necesis trairi ankoraŭ unu ŝtupon de sia puriĝo. Versajne pro tio, zorgeme viŝante la radikon per maniko, li ekaŭdis sonon, kiu glaciigis la sangon en liaj vejnoj: super tajgo, forte tremigante noktan mallumon, trafflugis obtuza rorado, simila al fora tondro, - rorado de rufa korea tigo, reganto kaj caro de tajgo.

Kim volis sin ĵeti por fusilo al la kadavro de Jiang-Kui, sed liaj gamboj ne obeis lin, kateniĝintaj de antikva hereda teruro. Li falis vizaĝaltere kaj komencis elparoli ĉiujn preĝojn, kiuj vizitis la kapon, al la Patro-Tigro. La malalta rorado eksonis super verda maro ankoraŭfoje, kaj pli proksime. Ĉiuj tajgaj bruetoj tuj silentiĝis.

Ĝi estis olda granda sperta besto. Herdo de aproj, kiun ĝi ĉasis en montoj, jam tute estis formangiĝinta ankoraŭ antaŭ tri tagoj. Urso, kiu renkontiĝis kun ĝi, savis sin sur lariko. La tigo estis tre malsata. Aŭdinte pafojn en valo, ĝi haltis kaj alpremiĝis al la tero. Poste la pafoj eksilentis. La malsato kaj mallumo venkis timemon. Ĝi ŝtelirante malsupreniĝis de sur roka montaro, kaj eksentis koreksitan odoron de freŝa homa sango. La etaj oreloj, fermitaj de grizaj harfaskoj, premiĝis al granda triangula kapo, kiun la Kreinto mem signis sur la frunto per mistera hieroglifo «Wang», kio signifas – Princo. Longa vosto konvulsie vipis la striajn flankojn. Ĝi jam gustumis varman homan sangon en vintro, perforte penetrante en fanzojn de lignohakistoj kaj novloĝantoj. Ĝi memoris, ke homo estas facila predo.

Kim ne havis kuraĝon moviĝi, eĉ ekspiri. Sur kontraŭa bordo de roĵo al li ekŝajnis ia brueto. Li eksentis ies rigardon. Kiel sub influo de hipnoto, li levis la kapon: antaŭ li je la dudek paŝoj, en mallumo apude brilis du verdaj grandaj vakaj smeraldoj.

Kim aĥis, sed peza laneca karno de la tigo post salto ĉifis lin. La homan vizaĝon atingis putra odoro el faŭko de la besto. Frapo de la forta piedo tre rapide surdorsen kuŝiĝis lin, kaj la kranio disfendiĝis kiel nukso inter sabreaspektaj dentoj. Li ne sukcesis eĉ ŝriki.

Mortiginte Kim-on, kaj formanĝinte la plej frandajn partojn de la karno, la tigo foriris al roĵo, kaj dum longa tempo kun ĝuo lektrinkis malvarman akvon. Poste ĝi revenis al restaĵoj de la koreo, kaj ekvidis la Radikon de Vivo, elfalintan el la manoj de la homo. Ĝi per sia tre aspra lango unufoje lekis la ĉifonon, saturitan de sango, per la muzelo tuŝis la ginsengon, sed la radiko odoris teron. Preninte per la dentoj femuron de la koreo, la tigo malrapide foriris al tajgo.

La radiko restis surtere, apud la roĵo. Ĝin ne tuŝus besto, ne bekus birdo. Certe, ĝi neniam putriĝus. Se ĝi restus kuŝi tie, ĝi iom post iom enteriĝus kaj dormus subtere dum unu aŭ dek, aŭ eĉ kvindek jaroj, ĉar du paroj de malicaj hommanoj ofendis ĝin per tuŝado, post kiam devota Li-Fulin per la fosileto el korno de cervo elterigis ĝin. Finfine ĝi ekĝermus, saturita de energi plena viva forto.

Sed ĝi kuŝis nur du tagojn. Dum sunleviĝo de tria tago ĝin trovis Nikolao Timofeeviĉ kun alnomo «Tigra Morto», la sama Nikolao Timofeeviĉ, kiu kun sia frato kaj helpanto foje kaptis junajn tigridojn en tajgo.

Tie juna caro de tajgo trafis en vagonon, kiu direktiĝis al Vladivostoko. En la urbo oni transigis la tigron en kaĝon, kaj por mil anglaj pundoj mare ĝi estis transportata al Hamburgo, en zoologian ĝardenon de sinjoro Gagenbek.

Tio estis profita entrepreno, kvankam preskaŭ same danĝera kiel ĉasado kontraŭ la «bluaj fazanoj». Foje malnova reto por kaptado disŝiriĝis en plej grava momento de

ĉasado, kaj de tiam la maldekstra mano de Nikolao Timofeeviĉ malbone leviĝis ĉe la ŝultro.

Ĉi foje Nikolao Timofeeviĉ unusola ĉasis ruĝan cervon, kaj hazarde ekvidis spurojn kiuj havis formon de koro. Li tuj kontrolis kartoĉon en fusilo, kaj direktis sin laŭ la spuroj. Tiel li atingis la rojon, kaj inter arbustoj sur bordo de la rojo li rimarkis disronĝitajn viscerojn kaj ŝirpecojn de vesto, super kiuj en hela matena suno svarmis kun zumado miloj da verd-bronzaj muŝoj.

Tiam li lasis la spurojn, transiris la rojon, kaj apud homaj restaĵoj trovis la Radikon de Vivo, kiun depuŝis la tigro. Li levis la ginsengon, kelkfoje turnis tiun en la manoj, kaj nur kapskuis. Liaj okuloj ekbrilis: tio preskaŭ egalas al blua ĉeko de sinjoro Gagenbek el Hamburgo.

Poste li rimarkis la fanzon, kaj, alirinte al ĝi, li ekvidis sursojle Li-Fulin-on, penetritan de kugloj, kaj apud arbustoj kadavron de Jiang-Kui, kuŝantan surdorse kun la disetenditaj brakoj. En la malplena fanzo al liaj okuloj prezentiĝis kavigita planko kaj truoj sur muroj. Li ankoraŭfoje turnis en la manoj la Radikon de Vivo, komparis ĉion vidatan, kaj, pririgardinte multajn spurojn, li pli-malpli restarigis ĉion, kio okazis.

– Kie estas ginsengo, tie ankaŭ estas tigroj!.. – li ekmemoris antikvan ĉinan proverbon, kaj la Radiko de Vivo komencis sugesti al si pli grandan imponon.

– Bone, poste ni vidos!.. - li laŭte respondis al siaj pensoj, zorge kuŝigis la radikon en muskon, volvis per betula basto, kaj, kaŝinte ĝin en dorsosako, direktis sin rekte trans montetoj al vilaĝo de sia frato.

Vespere li atingis la vilaĝon, sed la frato forestis. Skribinte al li etan leteron pri sia urĝa forveturo en Vladivostokon, li tuj iris plu, kaj tranoktis jam en dometo de sia amiko, surborde de golfo Petro la Granda. En sekva tago post tagmanĝo, dum boatisto disputis kun konkurantoj, navigante al bordo inter multaj senvelaj mastoj, li sukcese elsaltis sur ŝtonojn de urba bazono.

Nikolao Timofeeviĉ trapasis pulbazaron, laŭ krute leviĝanta strato trairis odorplenajn komercajn kioskojn, kaj manĝetis en taverno sub ŝildo “Kaledonia”. Poste li iris laŭ ŝika Svetlanskaja strato, kie bele vestitaj virinoj suspekto rigardis al lia tajga kostumo. Li rasis sin, tondigis sian hararon, kelkfoje deturnis sin maldekstren, kaj profundiĝis en komplikaj labirintoj de mallarĝaj stratetoj.

Blankhaŭtaj vizaĝoj same kiel farbitaj domoj jam malaperis. Laŭ koridoroj el fuŝpalpitaj, nigriĝintaj brikoj kun mallumaj likoj, haste iris tien kaj reen hodjaj en surtutoj kaj bluaj duonkaftanoj, malbutonitaj sur kupro-ruĝa brusto. Estis tre varme, kaj el mallumaj rojoj, sekiĝantaj sub pordegejo, leviĝis tia akra fetoro, ke Nikolao Timofeeviĉ kraĉis sur la teron kaj sakris.

Li kelkfoje sin haltiis, konsiderante, kien nun turni sin. Alirinte pordegon, flanke de kiu, krom nigraj tabuletoj kun ideograma skribaĵo, pendis reklampanelo kun senkapa oficira uniformo de pasinta jarcento, li memfide trapasis korteton, ĉirkaŭiris du angulojn de domo, kaj, trairinte mallongan tunelon, supreniris laŭ traa gisa ŝtuparo sur duan etaĝon. Tie vendadis diversajn kuracilojn lia konatulo Tung Zui-kung.

Tung Zui-kung-on li sciis dum longa tempo. Kiam oni malsukcesis kapti tigron viva, kaj necesis mortpafi tiun, Nikolao Timofeeviĉ ĉiam alportis al li harlojn, ostojn, koron, okulojn kaj aliajn partojn de mortigita besto, kiujn oni hontas elparoli. Ĉio ĉi uziĝis en pulvoroj, unĝentoj kaj tinkturoj, preparitaj per antikvaj manieroj por bezono de ĉina medicino. Kelkfoje la vendisto de kuracaj trinkaĵoj aĉetis de li velurajn, ankoraŭ molajn kornojn de cervo, kaj etajn radikojn de ginsengo, hazarde

trovitaj dum ĉasado en sovaĝa tajgo de montaro Sihote-Alin. Kiam tre necesis, Tung Zui-kung pruntis al li iomete da mono, kvankam procentege: metio de ĉasisto kontraŭ agresaj tigroj estas tre riska afero, kaj neniam, eĉ grandaj asekurkompanioj ne volis asekuri vivon de la ĉasisto «Tigra Morto».

Post pordo de la butiko la ĉasisto eksentis plezuran kaj komplikan odoron de mosko, santalo kaj ĉiuj sekigitaj herboj kaj restaĵoj de bestoj, kiuj estis penditaj sub tegmento kaj metitaj sur bretoj en ruĝaj kaj flavaj paketoj kaj etaj potoj, kovritaj per algluita papero.

En tiu momento la mastro preparis multekostan unĝenton, kiu krom ordinarajn medikamentojn enhavis cerbon de serpento, rostitajn lipharojn de foko kaj galon de bufo. Vidinte la ĉasiston, li ĝentile salutis lin, transdonis pistilon al filo, viŝis la vizaĝon kaj manojn per malseka mantuko, kaj invitis lin en internan ĉambron. Ĉe malalta tablo el ruĝa ligno okazis interparolo, kiu ludis gravan rolon en sorto de Nikolao Timofeeviĉ. Post kutima ĝentileco kaj trinkado de kelkaj tasoj da pale-verda teo, la ĉasisto transiris al afero:

– Ĉu vi scias, Tung Zui-kung, kion mi nun alportis por vi? – demandis Nikolao Timofeeviĉ.

La ronda, grava vizaĝo de la ĉino ŝajnis rideton, kiu demonstris tri orajn dentojn, tamen li pense eldiris: «Jen blankhaŭta stultulo!.. Ĉu mi estas Spirito por scii tion?».

Sed pro ĝentileco li diris:

– Mi ne scias. Ĉu malmolajn cervajn kornojn?

– Ho, tio estas bagatelajoj! Pli valoran aĵon! Mi trovis ginsengon, sed tian grandan, kiun vi neniam vidis.

La ĉino silentis.

Nikolao Timofeeviĉ eligis el dorsosako grandan skatolon por kartoĉaj komponantoj, metis ĝin sur poluritan kiel spegulo tablon, demetis kovrilon, kaj sin sidis, apogante sin sur dorson de seĝo, kaj enŝovinte la manojn en poŝojn.

Efektive, nur dufoje dum sia longa vivo Tung Zui-kung vidis tian radikon. Rigardinte la flavetajn faltoplajn kaj, kvazaŭ kurbigitaj de spasma, krurojn de la kriplulo, li nevole leviĝis, kaj malantaŭ liaj korna framo de okulvitroj ekflamis respekta admiro de kompetentulo kaj specialisto. Sed li tuj estingis la flamon per liaj konveksaj palpebroj. Nur rapideco, kun kiu ekmoviĝis liaj maldikaj sekaj fingroj, palpante kaj pesante la radikon, senmaskigis lian ekscitecon. Post kelkaj sekundoj li maltrankviliĝis, remetis la radikon en la skatolon, akurate ordigis muskon, kaj kaŝis la manojn en maniko de kitelo.

– Nu, kion vi diras? – fiere demandis la ĉasisto.

– Ĝi estas kultivita. – nekonsterneble respondis la ĉino.

– Kial ĝi estas kultivita?.. – ekkriis Nikolao Timofeeviĉ. – Kial vi, hodja, mensogas?..

– Mi, estimata, ne mensogas, - digne respondis la apotekisto. – Kie vi trovis ĝin?

– Kie? En tajgo!..

– Estas kultivita! – kapneis la ĉino. – Usona fuŝa produktaĵo. Usonanoj alveturigas multe da radikoj de ginsengo. Ĉinoj diras, ke tiuj estas malbonaj!..

– Kial vi, hodja, eldiras stultaĵon! – Kiaj usonanoj?.. Mi diras al vi, ke mi mem trovis ĝin en tajgo. Ĉu vi komprenis? Tigro buĉis serĉanton de ginsengo, kaj mi prenis lian radikon!..

– Malbona... - denove kapneis Tung Zui-kung. – Por unu funto da bona ginsengo mi pagas kvincent enojn, nur alportu! Por usona ginsengo – nur dekkvin, ne pli...

– Vi denove ruzas!.. Ne ĉirkaŭparolu, rekte diru, kiom da mono!..

La ĉino ankoraŭfoje pesis la radikon. - Kiom vi volas?

– Nu, milojn... sep milojn, ne malpli! Sed vi, fiulo, certe, vendos ĝin por dek miloj!

– Mi proponas ducent enojn. Ĉu vi volas – prenu, ne volas – ne prenu. Mi ne povas pli...

Nikolao Timofeeviĉ marĉandis kaj disputis kun la ĉino dum unu horo. Li proksimume sciis prezojn por la radikoj, kaj tre suspektis, ke la apotekisto mensogas, ke lia ginsengo kostas almenaŭ pli ol mil enojn. Tamen Tung Zui-kung firme asertis al li, ke tio, verŝajne, estas kultivita ginsengo, ekzemple el Kalifornio, kie usonanoj kultivas tiun el akiritaj ĉinaj semoj, kaj ĉinaj kuracistoj ne opinias la radikojn kuracaj. En Ĉinio tiuj radikoj tre malmulte kostis, tamen por funto da sovaĝa radiko, eĉ ĝi estus eta, apotekistoj pagis pli ol kvincent enojn.

Nikolao Timofeeviĉ ĵuris per Dio, admonis, insultis, sed la ĉino aldonis nur cent enojn al antaŭa prezo.

– Nu, bone, – pensis la ĉasisto, – nun estas tro malfrua tempo. Morgaŭ mi nepre ĉirkaŭpaŝos ĉiujn grandajn akaparistojn. Tamen se tiuj ankaŭ obstinos, tiam mi mem alveturigis la radikon en Pekinon...

Li ekstaris.

– Nu, hodja, sufiĉas arlekeni! Lastfoje mi demandas vin: kiom da mono vi pagos?

– Mi diras: tricent enojn.

– Vi diras stultajon!

– Mi ne povas pli!.. Se vi volas – prenu, se ne, do ne...

– Bone, mi iomete pripensos: morgaŭ, verŝajne, revenos...

La ĉasisto laŭte fermis la pordon, kaj brue malaltiĝis laŭ gisa ŝtuparo.

– La fiulo mensogas! Ne povas esti, ke tia radiko kostu nur tricent enojn!.. – li perplekse pensis.

Verŝajne li ne dubus pri tio, se li povus aŭskulti interparoladon, kiu okazis en la butikoj, post kiam li fermis la pordon.

Subite la flegma vendisto de kuracaj trinkaĵoj tute ŝanĝiĝis. Lia karna vizaĝo komencis tiki pro malpacienco, kaj la voĉo rompiĝis kiam li rapide flustris ordonojn al siaj filo kaj eta nepo. Tiuj kun granda miro rigardis al li, sed pro respektemo al gepatroj kontraŭdiris nenion.

– Ĉu vi ĉion komprenis? - li demandis. – Tiam iru kaj sen la radiko ne revenu!..

Eĉ kiam ili ambaŭ foriris, Tung Zui-kung dum longa tempo ne povis kvietiĝi.

– Kiel la sankta Radiko trafis en la manojn de la blankhaŭta diablo? Kial permesis tion la genio-gardisto? – pensis la oldulo, rigardante, kiel sur pinto de nadlo super lampo pufiĝas bruna larmo de opio. Kaj nur, kovrinta lin vualo de leĝera dolĉa fumo, kiu leviĝis el lia masiva pipo, iomete kvietigis la eksciton.

Ankaŭ Nikolao Timofeeviĉ sentis sin malkvieta.

– Kio okazis?.. Kial Tung Zui-kung avaras? Neniĉiam li estis tia.. Sed li nomiĝis mia bona kunulo!.. – pensis la ĉasisto, descendante laŭ pavimita strato.

Tie, sur trotuaroj, ĉinoj apud siaj butikoj jam lumigis miloj da etaj lanternoj, starantaj surtere, kiel en Rusio, kiam oni konsekras paskajn pladojn. Sub grandaj ombrelaj odoris tropikaj fruktoj, dismetitaj je kolorriĉaj stakoj, kiuj per sia aromo neniigis ĉinan fiodoron. En etaj restoracioj kun koloraj vitroj tondre bruis gongo, tremigante aeron, akre sonis fifroj kaj unukordaj arĉaj muzikiloj. La ĉasisto eksentis naŭzon pro tiuj nekutimaj odoroj kaj sonoj, kaj li direktis sin tien, kie estis blankhaŭtaj homoj, sed ne tiuj glitaj nigraj homfiguroj, kiuj, sendube, odoris morton.

Elirinte sur ĉefan straton, li nevole ekrigardis dekstren: tie alte supre kaj inter geometriaj rokoj de domoj ankoraŭ tre ardis aŭrora fendo, dispremita de plataj inkkoloraj nuboj. Sed flanke de suda parto de la urbo jam moviĝis malvarma nebulo trans kreko renkonte al homamaso. Kovrinte golfon, la nebulo transiĝis parapetojn de urba ĝardeno, kaj rapide moviĝis al sunsubiro laŭ strato per apartaj fibroj, kiuj ne perdis formon.

Ŝtonpavimo nigriĝis pro malseko, blankvestita homamaso levis la ŝultrojn post taga varmego kaj malgrandiĝis. Nikolao Timofeeviĉ atingis ĉefpreĝejon kaj ĉe stratangulo renkontiĝis kun konatulo, kiu alkondukis lin por vespermanĝi en restoracio «La Ora Korno».

Nikolao Timofeeviĉ certe memoris, ke al li estas malpermesite drinki vodkon, ĝis kiam li vendos la Radikon de Vivo, sed al ilia tableto alsidiĝis konata kanzoneto, kaj li permesis al si eldrinki malgrandan karafeton da pika kaj acerba likvaĵo.

Nome per sia konduto, havante kun si la Radikon de Vivo, li faris, sendube, la saman eraron, kiun faris ĝis li kaj Li-Fulin, kaj Jiang-Kui, kaj koreo Kim. En tajgo li dekutimiĝis vodkon, kaj tre ebriiĝis post unuaj tigoglasoj. Cetere, tiam kulpis ne nur vodko, sed hela lumo, homamaso, muziko, kaj tre grave – proksimeco de virino.

Li ekkuraĝis, al sia damo li mendis ian mirindan punĉon, kiu blue flamis, kaj eĉ li provis estri orkestron sur estrado. Sed en dekunua kaj duono li pace ekdormis, metinte la kubutojn sur tablotukon. Lia konatulo ne tre ebriiĝis, sed ne sukcesis elpensi kien alkonduki «Tigran Morton» por tranokti, ĉar pro vica ŝanĝo de registaro, nova ŝtatestro rekviziciis ĉiujn ĉambrojn en gastejoj.

Estis momentoj kiam Nikolao Timofeeviĉ rekonsciiĝis, kaj en tiuj minutoj li strebis veturi al sia baptanino, sed la kanzoneto estis bonkora virino, kaj proponis al la konatulo alveturigi la ĉasiston al ŝi, en gastejon «Boroviks». Nikolao Timofeeviĉ embarase malaltiĝis laŭ verda ŝtuparo de la restoracio en stratan nebulon kaj sidiĝis kun la virino en fiakro. Ĉe pordo mem al li subite molestis du ĉinaj malriĉuloj – plenaĝulo kaj infano.

– Ŝajnas, ke la vizaĝoj estas konataj... Kie mi povis vidi ilin?.. – ekpensis Nikolao Timofeeviĉ, sed vodko, kiel estas konate, ne kontribuas al aktiveco kaj klareco de pensoj.

La fiakristo komence vipis ĉevalojn, poste la malriĉulojn, kaj galopis trans monteto laŭ nepavimita strateto. Transveturinte intermonton, ili haltiĝis apud izolita domo, situanta sur holmo.

La kanzoneto okupis sur unua etaĝo tre etan ĉambron, kun fenestroj, tra kiuj nur estis vidata deklivo de najbara monteto. La ĉambro sorbiĝis de parfumo, malkara pudro kaj lampa petrolo. Kiel li trafis sur liton, Nikolao Timofeeviĉ ne tre klare konsciis. Li nur zorgis pri sia ginsengo, eligis ĝin el la skatolo, kaj metis tiun sub kusenon.

– Ho, tute frenezigi la pasaĝero! – verdiktis la kanzoneto, kaj kiam la gasto ekronkis, ŝi per la du fingroj prenis el sub la kuseno la miraklan Radikon de Vivo, kaj forĵetis tiun sur plankon. Ŝi nenion komprenis en ĉina medicino.

Proksimume post unu horo, la virino subite vekigiĝis pro ia brueto, kaj levetiĝis surlite. En nokto ŝi ĉiam ŝlosis fenestrojn, sed nun unu el fenestroj estis iomete malfermita. Ŝi sentis surbruste fluon de malseka nokta venteto. Malhela luna lumo, kiu penetris tra indiana kurteno, en formo de malrekta kvarangulo kuŝis sur farbita planko. Kaj jen tie, en malhela radiaro, ŝi rimarkis volvaĵon de la gasto, kiun ŝi neglekte forĵetis sur la plankon. Balanciĝante enaere, la volvaĵo moviĝis rekte al la

fenestro. La virino saltis de sur lito surplanken, kaj tuj aĥis, ĉar frunte puŝiĝis kontraŭ pinto de longa bambua fiŝkano.

Postaj eventoj okazis tre rapide. La fenestro tuj vaste malfermiĝis, ŝi eksentis sur la nudaj ŝultroj tuŝon de ŝnuro, kaj buklo, streĉiĝinta surkole, preskaŭ forŝiris ŝian kapon kun fulmrapida doloro. Ŝi, konvulse moviĝante, ekronkis, kaj baldaŭ, sidante surplanke, perdis konscion.

Nikolao Timofeeviĉ vekiĝis pro la bruoj, sed pli frue ol li sukcesis ion kompreni, forta frapo kontraŭ la tempio surdigis la ĉasiston, poste kuseno kovris lian vizaĝon, kaj sur la piedojn malleviĝis mola, peza homa karno. Dum luktado por vivo li etendis la brakojn el sub litkovrilo, permane kaptis kaj ektiris ion. Knarado de disŝirita silko estis lasta sensaĵo de sufokiĝanta homo. Malantaŭ muro najbaroj ekturnis sin surlite kaj insultis, sed en la domo eĉ unu nokto ĉu iam pasis sen skandalo?

En sekva tago sur tria paĝo de «La Vespera ĵurnalo» aperis grandlitera anonco: «Dramo en gastejo “Boroviks”. Laŭ informo de nia kunlaboranto ĉe estro de kriminalpolico, en la gastejo estis kruelege strangolitaj kanzoneto M. kaj ĉasisto P. Denove hunhuzoj*!»

Post unu semajno, kiu scias ĉinan lingvon povus tralegi ankaŭ sur tria paĝo de ĉina ĵurnalo «La Lastaj novaĵoj» tre modestan anoncon, ke sinjoro Tung Zui-kung, vendisto de kuraciloj, informas siajn estimatajn aĉetantojn pri tio, ke li en Hai-Shen-Wei transdonis siajn aferojn al sinjoro Li Kin-hi, kaj li mem forveturas al sia patrolando en provincon Shanshji, por pasigi reston de sia vivo apud tomboj de siaj praŭloj.

Legantoj de ĉina «La Lastaj novaĵoj» ne legas rusan presaĵon «La Vespera ĵurnalo», kaj legantoj de la rusa ĵurnalo ne legas la ĉinan ĵurnalon «La Lastaj novaĵoj». Krome, se eĉ ambaŭ ĵurnaloj havus komunajn legantojn, al kiu el ili alvenus en la kapon ideo kunligi tiujn du tute diversajn novaĵojn?

Jen tial sur ŝipo, fornaviganta suden, doganisto, kiu kun abomeno traserĉis odorajn kofretojn de Tung Zui-kung, trovis grandan ruĝan skatolon. En ĝi sub vitro, sur tavolo de vato, kuŝis simile al blank-sukcena pufeta pupo, daŭre boligita en sukera akvo, kaj purigita for de malglata haŭto, granda diafana ginsengo.

Sed imposto laŭ rusaj dogantarifoj ne rilatis al la Radiko de Vivo. Oni ne malpermesis elveturigi la ginsengon, kaj la oficisto, enmane turniĝinte ĝin, remetis tiun sur la vaton.

– Nu, kia grandega estas via ginsengo, hodja! – la doganisto diris kun plaĉo kaj eta envieco: ĝi estis iomete kompetenta en ĉina medicino.

Tung Zui-kung ĝentile ekridetis per sia karna vizaĝo, senhaste klinis sin, kaj ŝlosis la kofreton.

Hai-Shen-Wei – (Golfo de tripangoj) - ĉina nomo de Vladivostoko.

Fanzo-[ĉin. fangzi] – tradicia ĉina domo.

Hunhuzo – [ĉin. hónghúzi] (ruĝbarbulo) - ĉina rabisto.

Dajano – [ĉin. dàiyáng] –granda arĝenta monero kiu valoris proksimume unu oran rublon.

Hodja – (kolportisto) – neglektita moknomo por ĉinoj.

Ĉoho – etvalora monero kun aperturo enmeze.

Eldonejo «Vrata» Ŝanhajo 1943


*Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko
(E-klubo "Pacifiko", Vladivostoko)*



Libroj

Rigardo post 100 jaroj

Antaŭ 100 jaroj, en 1918, finiĝis la unua mondmilito, kiu difinis la sortojn de la tuta 20-a jarcento kaj, fakte, influas la vivon ĝis nun. Ekzemple, ni ne forgesu, ke ĝi



fariĝis la ĉefa puŝo por komenco de la 2-a Rusa revolucio en 1917, kaj difinis ĝian karakteron, rezultojn kaj sekvintan intercivitanan militon! Ĝi neeviteble tuŝis ankaŭ la Esperanto-komunumon, kiu mem draste transformiĝis rezulte de ĝi. Kaj superrigardo de esperantistoj pri tiu terura historia evento estas logika kaj bezonata. Responde al tiu bezono aperis la libro “Antaŭ unu jarcento”, iniciatita kaj kompilita de José María Salguero (Kani) kaj Javier Alcalde (Xavi), kaj eldonita de SAT eldona fako kooperativa.

La libro havas “mozaikan” karakteron, konsistante el tute malsamaj eroj de tute malsamaj aŭtoroj, parte el “klasikaj” tekstoj de Zamenhof, Lanti, Privat ks., el rememoroj de partoprenintoj de la milito, el eseoj antaŭe jam publikigitaj aŭ speciale

verkitaĵoj por la kolekto. En la unua parto de la libro temas pri ĝeneralaj historiaj momentoj, ligitaj al la milito vide el diversaj landoj (ankaŭ tiuj, kiuj fakte en la milito mem ne partoprenis, kiel Hispanio), en la dua parto temas pri esperantista aspekto de la afero – ja esperantistoj estas (kaj tiam estis) ordinaraj homoj, kiuj same, kiel ĉiuj aliaj estis envolvitaj en la aferojn de siaj landoj – sed, certe, ofte havis alian rilaton kaj vidpunkton, ol ĉiuj aliaj samcivitanoj. Ne hazarde sur la kovrilpaĝo troviĝas foto de E. Lanti en la franca milita uniformo – li ja estis militpartoprenanto (eĉ se helpmedicinisto) – sed li ĝuste tiam lernis Esperanton!

Interesa fakto: la enkondukon verkis prof. Brigid O’Keeffe el Brooklyn Kollege; ŝi ne estas esperantistino (almenaŭ aktiva), sed renoma fakulo pri historio de Rusio kaj Sovetunio – kaj kun granda seriozeco rilatas al Esperanto kaj ties historio. Estas grava fakto por krei ponton inter historio de Esperanto-komunumo kaj ĝenerala historio en la okuloj de la sciencistoj.

Por montri la variecon de la enhavo, ni listigu tiujn, kiuj verkis aŭ tradukis kontribuojn por la libro: Eugène Adam (Lanti), Javier Alcalde, J. Borel, Ed Borsboom, Lucien Bresler, Henry Broadbent, Mikaelo Bronŝtejn, István Ertl, Nikolao Gudskov, Claudine Guéguen, Javier Guerrero, Walter Guhr, Stanislav Kamarýt, Luis Ladeira, Eduardo Larrouy, R. Lederman, Petro Levi, Albert Louvrier, Miroslav Malovec, Antonio Marco Botella, Vinko Markovo, Otto Maschl, Robert Murray, Brigid O’Keeffe, Marius Paulet, Thérèse Pinet, Roland Platteau, Edmond Privat, José Salguero, Martine Schneller, Richard Schneller, Gustav

Scholze, Jean Selle, Jens Stenggaard Larsen, Humphrey Tonkin, Bernhard Tuider, Urtzi Urrutikoetxea, Nikolao Xil Karvaljo, Ludoviko Zamenhof. Tiu mozaikeco de la libro donas certan stereoskopian bildon kaj pri la milito, kaj



pri historio kaj sorto de Esperanto-komunumo. Sendepende de tio, kiom grave la leganto konas la koncernan historian epokon, ĝi donas al ĉiu novajn sciojn pri ĝi kaj novajn imagojn pri la gravega evento. Rigardoj pri la milito en diversaj formoj venis al la libro ne el

ĉiuj koncernaj landoj, sed eĉ tio, kio estas, grandegas laŭ la farita laboro de la kompilintoj de la libro – 375 paĝoj estas estiminda cifero!. Eble, ĝi instigos novajn kontribuontojn kaj aperos nova, ampleksigita eldono. Sed sendepende de tio, ĝi devus troviĝi en ĉiu bona esperantista biblioteko, kaj fariĝi nepra legaĵo de ĉiu verdstelano.

Nikolao Gudskov

Konkurso de tradukoj

En la 4-a (maja) numero de CkK estis proponita traduko de “fluganta esprimo el Nekrasov «Бывали хуже времена. но не было подлей». Bedaŭrinde, la propono ne tre interesis niajn kreemulojn, kaj venis respondoj de nur 3 personoj. Por juĝi, kiu estas la plej bonaj, materialo iom ne sufiĉas, kaj nun ni montras ĉiujn rezultojn, kaj vi juĝu mem, kiu el la proponitaj solvoj estas la plej adekvata:

"Epok' pli acxa estis jam, / Plej fia estas nun" (Tatjana Auderskaja)

Pli acxaj tempoj estis, jes, / Sed la pli fiaj - ne. (Viktoro Aroloviĉ)

Okazis pli peniga temp', sed pli malnobla - ne. (Gennadij Ŝlepĉenko)

Humuro kaj satiro

Atendu mian donacon!



Teksto kaj muziko de Mikaelo Povorin

Bonan tagon, samklubanoj miaj karaj!
 Mi informon havas gravan kaj plezuratan.
 Mi deziras per donacoj malavariĝi
 Helpi vian plialtiĝon pri kulturan.

Multajn librojn havas mi en mia domo.
Kvant' ilia estas pli ol mi bezonas.
Ion plaĉan trovos nepre ĉiu homo.
Geamikoj, ilin mi al vi proponas.

Se vi estas dume freŝaj komencantoj,
Tamen lerni ĉiam bone vi preferis,
Jen kantaro, kie estas ĉiuj kantoj,
Jen klarigo, kien Gerda malaperis.

Progresantoj konatiĝu kun regalo
El verkaro de dekduo da poetoj,
Kaj kun Kruko kaj Baniko el Bervalo,
Kun kompletoj de sekretoj el sonetoj.

Al spertuloj tre utilas bona scio
Por plezuro kaj por ĝenerala klero
Pri la vivo en la land' Kazohinio,
Pri la fluo de la akvo de l' rivero.

Venis tempo mian riĉon utiligi.
Mi pri tio certas, kaj ne estas dubo.
Miajn librojn nepre endas ja apliki.
Mi donacu ilin do al nia klubo.

Mi fordonus ilin ĉiujn. Kial ŝpari?
Venu, prenu miajn librojn sen hezito.
Tamen dume mi ne povas tion fari:
Sur la libroj sin apogas mia lito...

Noto. 02.08.2017 – 01.06.2018. Mikaelo koncipis la kanton dum veturo en trajno al RET-2017. T. G. rakontis al li pri la priskribita situacio koncerne siajn librojn. Mikaelo tuj elpensis muzikon, sed la teksto estis dum preskaŭ dum 10 monatoj nepreta. Kiam ĝi finpretiĝis, la 1-an de junio 2018, spektante filmon en kinejo, Mikaelo komprenis, ke la unua varianto de la melodio al li ne tute plaĉas: ĝi havas paŭzon meze de ĉiu verso, kaj tio sonas iom miskomprenige. Samvespere, la 1-an de junio, li iom riparitis tion, foriginte la paŭzojn preskaŭ sen ŝanĝi la harmonion kaj tonojn.



Асимметричный ответ
Александр Вульх

Свежее дыхание весны
Раскрывает дверцы и оконца,
Но не в радость ястребам войны
Над землей сияющее солнце.

Не скрывая ненависть и злость,
Точат клюв стервятники из НАТО.
Им Россия – словно в горле кость,
Словно прыщ на лбу – наш мирный атом.

Наша ширь распаханых полей
И лесов нехоженые тропы,
Словно шило в заднице у всей
Маленькой зажравшейся Европы,

Потому что здесь назло им всем,
Украшая милые просторы,
Во поле стоит наш «Тополь-М»,
Как апофеоз российской флоры.

Он стоит, качаясь на ветру,
Над согретым солнцем буераком,
Только шум ветвей не по нутру
Пресловутым натовским воякам.

И они, как стая злых ворон,
Что кружат в угоду мракобесу,
Обложили нас со всех сторон,
Угрожая миру и прогрессу.

Мы, конечно, мирная страна,
Но терпеть их силы нету больше.
Развелось их всюду до хрена,
В том числе – и в Чехии, и в Польше.

Что же делать? Кто подаст совет,
Как разумней поступить нам все же?
Думаю, что есть один ответ,
И другого быть никак не может!

Ради мира на земле своей
Мы в ответ под гулкий зов набата
Разведём в России голубей
И запустим их по странам НАТО!

Nesimetria respondo,
aŭ Peace dove ☺
Aleksandr Vulyĥ³

Spiro de l' printempa freŝa jun'
Jam impetas en fenestrajn vitrojn.
Tamen ne ĝojigas varma sun'
La militajn fiajn akcipitrojn.

Kun malic', malamo kaj envi'
Jam akriĝas bekojn tuta NATO
Kontraŭ mi kaj ankaŭ kontraŭ vi,
Kontraŭ rusa lando-malamato.

La vasteg' majesta de l' kampar'
Kaj aspiroj niaj filantropaj
Estas kvazaŭ laks' kaj nazkatar'
Por regantoj okcidenteŭropaj.

Ilin kolerigas ĉiam tro
Ĝis frenezo kaj ĝis furiozo
Nia raketaro "Poplo M" –
De l' rusia flaŭr' apoteozo.

Ŝtaras la raketoj en la vent'
Ĉe rojetoj en ravinoj ravaj.
Malkvietas ege la taĉment'
De la NATaj militistoj bravaj.

Ŝvebas ĉiuflanke kun minac'
La kornika nigra ar' sen ĉeso.
Kaj danĝeron kaŭzas ĝi al pac',
Al kultur' tutmonda kaj progreso.

Nia lando strebas ja al pac',
Sed ne eblas ilin plu toleri.
Damne! Tio tedaŝ ĝis agac'!
Venis tempo ilin jam klisteri.

Kion fari? Diru do, amik'.
Ĉu kapablas vi konsilon doni?
Solvo estas. Drastos la efik'!
Jen mi kion ŝatus nun proponi.

Povas helpi jena savrimed'
Kontraŭ ag' perfida kaj aplomba:
Okupiĝu urĝe ni pri bred'
De amaso ega packolomba.

Flugu la birdar' en la ĉiel'

³ A. Vulyĥ apartenas al "Ordeno de kortezaj manieristoj", grupo de rusaj poetoj, formiĝinta en 1980-aj jaroj kaj publikiginta siajn poemkolektojn inter 1989 kaj 2004. Iliaj poemoj kombinas elegantecon de la formo kaj cinikeca (aŭ simple cinika) humuro, ili estas precipe ironiaj aŭ satiraj, ofte kun elementoj de parodio al famaj ŝablonoj.

Пусть летят по небу сизари,
Мирные доверчивые пташки,
Чтобы от зари и до зари
На Европу сбрасывать какашки.

Пусть кружат они, творя добро,
Распластавшись в небе белым
фраком,
Чтоб загадить всю систему ПРО
Англичанам, чехам и полякам.

Чтоб однажды утром по весне,
Как по мановению факира,
Вся Европа – по уши в говне,
А над ней весь в белом – голубь
мира!

Kun rukul', sed ne kun raŭka grako,
Kaj Eŭropon por mirinda bel'
Ornamadu per abunda kako.

Flirtu la bonfara pacbirdar'
Laboregu multaj-multaj miloj
Por prifeki daŭre sen avar'
La sistemon de defendmisiloj.

Kaj finfine en printempa verd'
Pro la birda nekredobla kvanto
Eŭropanoj dronu en la merd'
De l' kolombo blanka – pacgardanto!

*Esperanta traduko kaj muziko de
Mikaelo Povorin
Traduko: 16.11.2018*

Nesimetria respondo

Teksto de Aleksandr Vulyĥ,
esperantigis Mikaelo Povorin

Muziko de Mikaelo Povorin

The musical notation is in 4/4 time and consists of three staves. The first staff has a treble clef and a key signature of one flat (Bb). The notes are: D4, E4, F4, G4, A4, B4, C5, D5, E5, F5, G5, A5, B5, C6, D6, E6, F6, G6, A6, B6, C7. Chords above: Dm, A7, Dm, C, F, C, F, D7, Gm, C, F, B. The second staff has a treble clef and a key signature of one flat. The notes are: G4, A4, B4, C5, D5, E5, F5, G5, A5, B5, C6, D6, E6, F6, G6, A6, B6, C7. Chords above: Eb, A7, Cm, D7, Gm, C, F, Gm, C. The third staff has a treble clef and a key signature of one flat. The notes are: G4, A4, B4, C5, D5, E5, F5, G5, A5, B5, C6, D6, E6, F6, G6, A6, B6, C7. Chords above: B, Dm, E7, A7, Dm.

CERBE kaj KORE

n-ro 5 (73), decembro 2018

Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 100

**BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”**

**Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe
de ĝusta indiko de la fonto**

**CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-
metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi
ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru.**

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 25.12.2018